

LA KATALUNA POPOLKANTOJ

"La variété même du sol préparait et explique aussi la variété, la richesse de cette littérature du peuple. Ajoutez à ces conditions propices la caressante et vivifiante lumière, l'un des éléments constitutifs de l'âme catalane; ajoutez encore la protection ou les bienfaits de la température, qui ne sont pas négligeables non plus pour bien comprendre cette âme et la bien déterminer".

La poésie populaire catalane,
Jean Amade.

EL la diversaj manifestadoj pri popola arto, sendube la popolkanto havas plej grandan valoron etnikan kaj psikologian; tra ĝi kaj per ĝi oni povas ekvidi kaj studi la plej profundajn nuancojn de la animo de iu popolo; la popolkantoj estas klara spegulo de la popola animo, tiom kiom povas esti aliaj studelementoj konsiderataj de la sciencistoj kiel pli valoraj el scienca vidpunkto. Ĉiuj diversaj nuancoj de la animo estas troveblaj en la popolkanto, kiun la popolo scias krei kaj vivi same kiam ĝi ploras kiel kiam ĝi ridas, same kiam ofendite furiozas kontraŭ la malamiko kiel kiam en plena ĝojo ĝi ridas kiel infano, same kiam ĝi sincere kaj naive plendas kaj sopiras pro amo kiel kiam ĝi aŭdigas subtilajn satirajn vortojn kun rikana rideto. Zorge studante la kantaronojn de iu popolo, oni plej facile akiras la ŝlosilon por malkovri la sekretojn de ĝia animo.

La popolkanto estas mirinda verko de la tuta popolo, de tiu popolo ĝin aŭdanta kaj kantanta; samtempe ĉies verko kaj nenies verko, la popolkanto estas alprenata, influata, ŝanĝata, nuancata de ĉiuj, ĉar ĉiu estas ĝia legitima posedanto kaj neniu povas absolute rigardi ĝin kiel propran havaĵon: ĝi apartenas al tiu, kiu scias bone ĝin kanti aŭ ĝin aŭskulti. Tial la popolkanto atingas tiun ĉarmon, neimiteblan de ia ajn homa scio, ĉar ĝi enhavas la esencon de la spirito de tiuj kiuj ĝin kantis, ĝi enhavas pecon de la animo de ĉiuj kiuj, ĝin kantante, en ĝin metis ion el si mem. La popolkanto havas spiriton pli intiman kaj allogan ol ia

ajn verko de plej genia aŭtoro, ĉar tiu-ĉi povas enblovi en sian verkon nur sian animon, kaj la popolkanto riĉiĝis per fajreroj el la animo de ĉiuj kantintaj ĝin.

La popolkanto, kvankam ĝi estas propraĵo de tuta popolo, kiel ĉia verko kun kolektiva karaktero, tamen ĉiam estas en la komenco frukto de la inspiro de unu sola persono, kiu en speciala graco-stato diktas la kanton. Se per ĝi li sciis vibrigi la fibrojn de la popola animo, se li sciis interpreti la komunajn sentojn de la popolo, la unua aŭskultinto de la kanto alproprigas ĝin al si, li kantas ĝin denove, sed li ne ripetas ĝin tute fidele, ĉar kanto estas io kio eligas el la animo, kaj, ĉar ĉiu el ni havas sian animon, ĉiu senkonscie modifas la kanton akorde kun la animo propra. Same kiel estas neeble trovi du animojn absolute egalajn, ankaŭ estas neeble ke kanto estu ekzakte egale kantata de du malsamaj buŝoj. Ĉiu nuancas kaj modulas ĝin laŭ la propra sento, kaj tiel estas senkonscie kreata de la tuta popolo la granda verko. Se tiu, kiu diktis la kanton, trafis la temon, sed ne sciis sufiĉe dece disvolvi ĝin laŭ la popola gusto aŭ maniero, baldaŭ la popolo vestos ĝin per pli konvena vestaĵo, donante al ĝi kio al ĝi mankas, kaj forigante de ĝi kio kun ĝi ne akordiĝas.

La kanto estas la esenco de la popola arto. La popolo, en daŭra kontakto kun la Naturo, ne scias ĝin pentri aŭ skulpti kiel faras la artisto, sed ĝi scias kanti, kaj ĝia scio en tiu arto estas tiel granda, ke la plej lertaj muzikistoj ne superis ĝin, kaj ili devis imiti ĝiajn kantojn. La unuaj majstroj en la muzika arto trovis en la popola muziko la fonton de inspiro por tiuj verkoj kiuj al ili donis pli da famo.

La homa kreipovo estas ege malgranda kompare al la senmezura kreado de la Naturo; la pentristo, en siaj produktaĵoj, zorgas imiti plej bone la linion kaj la koloron kiujn al li prezentas la Naturo; la skulptisto, en siaj verkoj, neniam apartiĝas de la naturaj linioj, kaj ju pli bone li kopias ilin, des pli granda estas lia merito; sed la bruoj de la Naturo ne havas sufiĉan variecon por produkti melodion superbelan: la bruego de la tondro, la muĝado de la maro, la siblado de la vento, la tintado de la akvo, la pepado de la birdoj, la ruliĝado de la ŝtonoj, la skuiĝo de la folioj, la bleko de la ŝafo aŭ de la ĉevalo, ne havas sufiĉan tonvariecon por kontentigi la muzikan avidecon de la homa spirito, ĉar ĉiuj bruoj de la Naturo, de la plej fortaj kaj akraj ĝis la plej dolĉaj kaj mallautaj, apartenas al la muzika ŝlosilo de *fa*, kaj la ceterajn muzikajn ŝlosilojn devis krei la homa muzikemo. La popolo, ĉiam vivanta en plena Naturo, rimarkis ĝian muzikan unutonecon kaj sentis la neceson plenigi sian animon per novaj sonoj kaj tonoj de harmonia melodio, kaj ĝi kreis la kanton kun variecaj sonoj, kiujn poste la teknikistoj konvene klasifikis kaj studis.

La forto de disvolviĝo de la popolkanto, kiam tiu-ĉi bone enradikiĝis en la spiriton de la popolo, estas nemezurebla; nenio ebligas la perfortan detruadon de la popolkanto; ĝi nature alvenas al la morto pro biologia leĝo reganta ĉion, sed intence kaŭzi ĝian morton estas neeble; ekzistis foje kantoj kun senco satira kaj malhonoriga kontraŭ altranguloj, kiuj estis severe persekutataj, sed ili rezistis la povon de reĝoj kaj potenculoj kaj pluvivis jarcentojn post la morto de iliaj persekutintoj.

La plej granda el la arkitekturistoj kreas ĉefverkon, mirindan konstruaĵon kiu estas frukto de longaj jaroj da studo kaj rezulto de la progresinta arto de kelkaj generacioj, sed iun tagon alvenas la plej stulta el la homoj kaj per torĉo aŭ per fosilo bruligas aŭ disfaligas la mirindan verkon, monumenton starigitan de la antaŭaj civilizacioj. Male, simpla paŝtisto iun tagon sentas la neceson poeziigi la silenton, rompi la pezan unutonecon de la senlabora vagado; li eligas belan kanton reflektantan la ĉirkaŭan belecon; ĝi havas la fluecon kaj freŝecon de milda ŝpruceto de proksima fonto, la diafanecon de la purega ĉielo, la brilecon de la malseka musko tapiŝanta la valon, la fortecon de la imponaj altegaj montoj; la kanto gracie fluas el la lipoj de la simpla kamparano, ruliĝas tra montoj kaj valoj, resonas al la senlimo, kaj la sorĉo estas farita: tiu kanto penetris en la internajojn de la tero, ĝi vivos, ĝi transiros de la monto al la ebenaĵo, ĝi floros sur la lipoj de multaj homoj, kun novaj nuancoj kaj pliriĉiĝoj. Tiu kanto, naskiĝinta en la senkonscio kaj en la indiferenteco, havos sekuran vivon kaj longtempe transiros de patroj al filoj. Jen: al la plej stulta homo estis eble detruita la genian verkon de granda artisto; al la plej potenca el la potencaj ne estos eble eĉ tuŝeti la humilan kanton kreitan de simpla paŝtisto.

En antaŭaj epokoj, kiam la pedagogiaj elementoj ne estis abundaj kaj la ŝtatoj zorgis tre malmulte pri la instruado de la popolo, tiu-ĉi uzis popularajn procedojn por eduki la infanojn kaj havis kiel unu el la ĉefaj rimedoj por vekti ĉe ili senton de moraleco kaj honesteco, la popolkanton kaj la popolrakonton; la gepatroj, speciale la patrino, ofte kantadis kantojn de forta morala senco, kiujn la gefiloj lernadis kaj tiel inklinis al la bono; la personoj kaj la faktoj de tiuj kantoj estis ofte aludataj kaj uzataj por fari komparojn; la patrinoj minacadis per la punoj montrataj en la kantoj kaj rakontoj; tiaj aludoj kaj komparoj kaŭzis la naskiĝon de multaj proverboj.

Granda nombro da popolkantoj estas internaciaj; nur tiuj havantaj karakteron tre lokan apartenas al unu sola nacia kantarano; la psikologiaj bezonoj de la popolo estas preskaŭ egalaj en ĉiuj landoj; la popola animo, kiam oni rigardas ĝin en ĝia aspekto plej simpla kaj primitiva, aperas preskaŭ ĉie egala; tiu simileco

kaŭzas ke la samaj temoj estas pritraktataj de unuj kaj de aliaj popoloj, kaj pro tio multaj popolkantoj apartenas samtempe al kelkaj nacioj; tamen, kvankam la temo de la popolkanto estas la sama, kaj foje eĉ la personoj, varias en forta grado la disvolviĝo kaj la lingvaĵo, kiuj ne povas eviti la influon de la ĉirkaŭaj kondiĉoj. Oni facile komprenas ke ne povas havi la saman difanecon tiuj kantoj kantataj apud la marbordo, ĉe la murmuro de la ondaroj, kie la kantanto rigardadas la senliman horizonton kaj kie la spirito povas vastiĝi kiel la senfina maro, kaj tiuj aliaj kantataj en la fundo de valo ĉirkaŭata de altegaj montoj, kie la kantanto vidas nur malgrandan parton de la ĉielo kaj kvazaŭ sufokiĝas pro la malvasteco de la horizontoj. Ankaŭ ne povas esti plene samaj la kantoj de landoj kie la neĝo kovras la teron dum pli ol duono de la jaro kaj la ĉielo estas konstante griza, kaj la kantoj de landoj kie la suno brilas per la tuta forto de siaj radioj. Sed, malgraŭ ĉio, se oni ne tro atentis pri la ekstera formo, oni trovas multajn popolkantojn vere internaciajn.

La similaj psikologiaj bezonoj eble kreis similajn kantojn ĉe diversaj popoloj, sed tio ne estas la sola kaŭzo de la ekzisto de internaciaj popolkantoj: multaj el ili eble estas transportitaj de unu lando en alian. Same kiel kanto *kreita* de unu sola nekonata persono bezonas plaĉi al la ĝenerala gusto por fariĝi popola, ankaŭ kanto de iu popolo por transplantiĝi en alian bezonas havi iajn ecojn iel komunajn al ambaŭ popoloj.

Kelkaj estas la elementoj transportintaj la popolkantojn: pri tiu funkcio staras unuavice, ĉe la latinidaj landoj, la trobadoroj, lertaj kreintoj kaj disvastigintoj de plej belaj kanzonoj. Samtempe portante la spadon kaj la liron, ili iradis de palaco al palaco, de kastelo al kastelo, aŭdigante la harmoniajn plendojn de siaj liroj sube de la gotikaj fenestroj, de kie aŭskultadis ilin la bonvolemaj sinjorinoj, kaj aspirante kiel pagon nur afablan rigardon aŭ gracian rideton. Ili vizitadis la kortegojn de la plej brilaj nobeloj kaj partoprenadis en iliaj festoj, kie neniam povis manki la dolĉa kaj milda voĉo de la trobadora liron. Ili trakuradis ĉiujn landojn, tiam plene ekflorantaj, disportante la kantojn de la Provenca lando al la Gaŭla kaj de Gaŭlujo al Sicilio, miksanterte kaj kunfandante tekstojn kaj muzikojn, prenante unuj de la aliaj ĉion havantan belon kaj emocion. Al la produktado de la trobadoroj ŝuldas la kantaroj de la latinaj popoloj la netakseblan valoron de siaj plej brilaj juveloj.

Aliaj transportintoj de la popolkantoj estis la "juglaroj" aŭ "jonglistoj", antikvaj muzikistoj popularaj, plebejaj, kiuj kutimis akompani la trobadorojn en iliaj trakuradoj, estante iliaj servantoj kaj akompanante iliajn kantojn kaj liran ludadon per alia muzika instrumento. Eble ni ŝuldas al la juglaroj pli ol al la trobadoroj la konserviĝon de kelkaj kantoj, ĉar la trobadoroj aŭdigis siajn kanzonojn nur en la palacoj kaj altrangaj domoj,

antaŭ nobeloj kaj kavaliroj ne rilatiĝantaj kun la malalta popolo, kaj la juglaroj kontraŭe kantadis sur placoj kaj stratoj la kanzonojn lernitajn el la trobadoroj, kiam ili ne plu servis tiujn.

Ankoraŭ alia rimedo por disvastigado de la popolkantoj estis la pilgrimantoj, kiuj longajn jarojn migradis tra la kristanaj landoj, traŭrante monaĥejojn kaj abatejojn. Kredeble ili disvastigis la kantojn kun senco mistika aŭ religia. Ankaŭ kontribuis al la disvastigo de la popolkanto la almozuloj, kiuj dankis la donon de almozoj per kantado. La almozuloj en ĉiuj epokoj estis grandaj vaguloj irantaj tra ĉiuj landoj.

La popolkantoj ampleksas ĉiujn aspektojn de la homa vivo. Ili dividiĝas en kelkajn specojn: meritas okupi la unuan rangon, pro sia beleco de formo en la melodio kaj en la teksto kaj pro sia perfekteco en la argumento, la kantoj *kavalirecaj*, kiuj pli ol la aliaj devenas el la trobadoroj kaj kutime temas pri amoj tre feliĉaj aŭ tre malfeliĉaj, pri epizodoj de bataloj kaj pri ĉiaj romantikaj aferoj. Iliaj protagonistoj ĉiam estas altranguloj.

Aliaj tre interesaj kantoj estas tiuj, kiujn oni kantas laborante, kies melodio plene akordiĝas al la ritmo de la laboro. Ilia tono estas tiel akorda kun la movo de la laborado, ke oni ne povas kanti ilin se oni ne faras precize la saman laboron al kiu ili estas destinitaj. Tiaj kantoj havas nur melodian valoron; la teksto estas indiferenta. Estas kantoj por diversaj laboroj, sed la plej multaj estas por laboroj en la kamparo: ekzemple, por plugi, falĉi, rikolti olivojn, por konduki la brutaron al la paŝtejo.

Alia ankaŭ tre interesa speco de popolkantoj estas la lulkantoj, kiujn kantas la patrinoj por dormigi siajn filetojn. Tiuj kantoj kutime estas tre sentoplenaj en sia melodio; ili estas tiel delikataj kaj molaj, ke ŝajnas ke nur la patrina amo povis inspiri ilin.

Atentindaj estas ankaŭ la kantoj de religia senco, en kiuj oni laŭdas la religian fervoron, oni priskribas miraklajn aferojn, vivojn de sanktuloj, k. t. p. Tiujn kantojn kutime uzas la almozuloj por peti la almozojn. La plej interesaj kantoj religiaj sendube estas tiuj kantataj okaze de la Kristnaskfestoj. Tiuj "Kristnaskaj" kantoj estas, solaj, unu el la plej gravaj partoj de ĉiu popola kantararo: kelkaj el ili estas veraj monumentoj de popola arto, same pri la muziko kiel pri la literaturo.

La plej grandan kvanton da kantoj, en ĉiuj popolaj kantararoj, konsistigas la kantoj amaj. Ilia temo estas ja ĉiam la sama, sed kun nekalkuleblaj nuancoj: la prikantado de la belecoj de knabino, la plendo pri ŝia malŝato, la priskribo de malfeliĉa amo, la sufero pro ĵaluzo, kaj multaj aliaj. Estas tre rimarkinde, ke preskaŭ ĉiuj tiaj kantoj estas ĉiam kantataj de viroj, kaj nur malofte la kantanto estas virino. La homo similas la najtingalon, kiu kantas nur kiam ĝi estas enamiĝinta; la kanzono flirtas en lia ĉirkaŭo kun ia indifereco, sed kiam alvenas la momento de la

kormoliĝo, kiam ama fajrero bruligas lin, tiam alkuras plej profunda inspiro, riĉaj esprimoj fluas, kaj li sin sentas preta dikti kanton, kiu disperdiĝos en la venton kaj proklamos la belecojn de la amatino aŭ plendos la turmentojn de ŝia neamo.

Multajn aliajn aspektojn prezentas ankoraŭ la popolkanto, sed ilia detala priskribo fariĝus senfina. La faritaj konsideroj, ni kredas, sufiĉas por sentigi al ĉiuj respekton kaj amon al la popolkanto, kiun ni ĉiuj devas klopodi konservi kaj disvastigi, ĉar ĝi estas unu el la plej valoraj patrohavoj de ĉiu popolo. Ni devas rigardi la popolkanton, same kiel ni rigardas aliajn artajn aŭ arkeologiajn trezorojn. En ĝi spiras la animo de niaj antaŭuloj, kaj per ĝi, pli ankoraŭ ol per aliaj aferoj, ni sentas nin ame ligataj kun la nin antaŭirintaj generacioj.

* * *

Ĝis nun ni parolis pri la popolkanto en ĝenerala senco: nun ni devas prezenti ekzemplojn de la popolaj produktaĵoj. Por fari tion ni uzos la katalunajn popolkantojn, ĉar ili estas la al ni plej konataj kaj familiaraj, kiuj vibrigis nin dum la tuta vivo kaj kiujn ni aŭdis en la frua infaneco ĉe la brakoj de nia patrino. Nu, ĉar por niaj ekzemploj ni prenos la katalunan kantaroon, ni devas ion diri pri ĝi.

La popola kanto kataluna, tiel en la teksto kiel en la melodio, estas, laŭ opinio de lertaj literaturistoj kaj muzikistoj, la plej inspirita kaj kortuŝa el ĉiuj kantoj de latinaj landoj. En ĝia spirita strukturo oni sentas la fortan influon de nia Mediteranea maro, kun vivaj koloroj kiaj ne estas aliaj en la mondo. Ĝi elspiras la emociion sentatan en la grandaj altaĵoj Pireneaj kie la animo sin sentas inklina al flugado, la ĝojon de la fruktubundaj ebenaĵoj karesataj de la viviganta Suno, la pacan kvieton de la ravanataj marbordoj kie korpo kaj animo vivas en vasteco kaj en libereco. La kataluna popolkanto, fidela spegulo de nia popolo, ne povis ne esti sub la influo de la lando kaj de la klimato, kaj kiel ili tute estas dolĉeco kaj mildeco. La popola poezio kataluna ravis altajn poetojn kiel Mistral kaj Verdaguer, kiuj, pli ol unufoje, deklaris ke ili abunde ĉerpis el ĝi; niaj popolaj melodioj inspiris al la granda Chopin liajn lastajn produktaĵojn; kelkaj famaj komponistoj ornamis siajn verkojn per muzikaj temoj katalunaj.

Koncerne la parencecon de la kataluna kantaroo, ni devas proklami ĝian fortan Provencan influon; multaj el niaj plej belaj popolkantoj devis esti enportataj en Katalunujon de niaj trobadoroj, kiuj kune kun la Provencaj trairadis la landojn, abunde dismontrante sian arton kaj sian altan senton pri la beleco. El la kanzonoj de trobadoreca deveno, eble unuj estas Provencaj, sed aliaj estas pure Katalunaj. Multaj el ili troviĝas ankaŭ en la Nordo de Italujo, kvankam iom malsimilaj en la formo.

Krom la kanzonoj "romancaj", la kataluna kantaroo havas multajn ekzemplojn plene proprajn kaj originalajn, kiuj ne nur naskiĝis ĉe ni, sed ankaŭ transpasis la limon de la kataluna lingvo kaj eniris en aliajn kantaroojn de lingvo jam ne kataluna.

Ankaŭ iom da hispana influo rimarkiĝas en la kataluna kantaroo, sed ĝi ne estas intensa; la hispanaj popolkantoj ne enradikiĝis ĉe ni, eble ĉar ili enhavas foje sencon de akreco kaj krueleco ne akordiĝantan kun nia karaktero. Troviĝas en Katalunujo kelkaj kantoj, kiujn la popolo kantas en tre nekorekta lingvo hispana, sed ili ne transsaltis en nian lingvon kaj, kvankam troviĝantaj en Katalunujo, ne povas esti akceptataj kiel katalunaj.

Originale verkis en Esperanto

JOAN AMADES kaj JAUME GRAU CASAS, L. K.

La muzikon de kelkaj katalunaj popolkantoj oni trovas en "Internacia Kantaro", de Paul Bennemann, eidonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

LA GRAFO-MORTINTO (1)

(Legenda)

La grafin' estas sidanta, — nobla vidvin'!,
 la grafin' en la palaco — sidigis sin.
 Prezentiĝas al la ĉambro — Di' helpu nin!,
 prezentiĝas al la ĉambro — Grafo-mortint',
 plenkovrata de ruĝflamoj — ho, kia tim'!
 plenkovrata de ruĝflamoj — Di' helpu nin!
 —Vi tutsola dum vespero, — fidel-edzin'?
 Vi tutsola dum vespero, — nobla vidvin'?
 —Mi ne estas tute sola — Grafo-mortint';
 mi ne estas tute sola — Di' helpu min!
 —Kiu do vin akompanas — fidel-edzin'?
 Kiu do vin akompanas — nobla vidvin'?
 —Dio kaj Virga Mario — Grafo-mortint';
 Dio kaj Virga Mario — Di' helpu min!
 —Kie estas la filinoj — fidel-edzin'?
 Kie estas la filinoj — nobla vidvin'?
 —En la ĉambro ili brodas — Grafo-mortint';
 en la ĉambro ili brodas — per bela silk'.
 —Ĉu mi povus ilin vidi — fidel-edzin'?
 Ĉu mi povus ilin vidi — nobla vidvin'?
 —Vi ja ilin tro timigus — Grafo-mortint',
 vi ja ilin tro timigus — Di' helpu min!
 —Lasu min preni filinon — fidel-edzin',
 ŝi konsolos la turmentojn — miajn sen fin'.
 —Kiel vi meritis ilin — Di' helpu min!
 sola nun suferu ilin — Grafo-mortint'.
 —Venu nur la plej malgranda — fidel-edzin',
 venu nur la plej malgranda — nobla vidvin'.

(1) La titolo estas "La Grafo Arnaŭ" (Arnau: propra nomo) kaj la vortoj "Comte l'Arnau" ripetigadas. Ni alprenis la solvon "Grafo-mortint", kiu liveras la necesan duonrimon. Ni ne pretendas esti farintaj ĝustan tradukon, sed nur ni volis iel prezenti tiun popolkanteton, kiu sendube estas unu el la plej antikvaj, gravaj kaj valoraj. — La tradukita teksto estas kunfandiĝo de la variantoj de Aureli Capmany ("Cançoner Català") kaj de L. Nicolau d'Oliver ("Del diàleg en la poesia catalana medieval").

—Same volas la pli junan — Grafo-mortint',
 kiel ankaŭ la pli aĝan — la kor-inklin'.
 —Kie estas servistinoj — fidel-edzin'?
 Kie estas servistinoj — nobla vidvin'?
 —Ili iris kuirejon — Grafo-mortint',
 ili iris kuirejon — Di' helpu min!
 —Kie estas la servistoj — fidel-edzin'?
 Kie estas la servistoj — nobla vidvin'?
 —En la lit' ili ripozas — Grafo-mortint',
 en la lit' ili ripozas — Di' helpu min!
 —Bone pagu la salajron — fidel-edzin',
 bone pagu la salajron — nobla vidvin'!
 —Kiam ĝin elgajnos ili — Grafo-mortint',
 kiam ĝin elgajnos ili — Di' helpu min!
 Nun tra kie vi eniris — Grafo-mortint'?
 Nun tra kie vi eniris — Di' helpu min!
 —Tra la kradita fenestro — fidel-edzin',
 tra la kradita fenestro — nobla vidvin'.
 —Ve, ĝin certe vi bruligis — Grafo-mortint',
 ve, ĝin certe vi bruligis — Di' helpu min!
 —Mi eĉ iom ĝin ne tuŝis — fidel-edzin',
 mi eĉ iom ĝin ne tuŝis — nobla vidvin'.
 —Kion ĵetas via buŝo — Grafo-mortint'?
 Kion ĵetas via buŝo — Di' helpu min!
 —Malbonajn vortojn diritajn — fidel-edzin',
 malbonajn vortojn diritajn — nobla vidvin'.
 —Kion ĵetas la okuloj — Grafo-mortint'?
 Kion ĵetas la okuloj — Di' helpu min!
 —Miajn malbonajn rigardojn — fidel-edzin',
 miajn malbonajn rigardojn — nobla vidvin'.
 —Kion ĵetas la oreloj — Grafo-mortint'?
 Kion ĵetas la oreloj — Di' helpu min!
 —Flamojn min elbruligantajn — fidel-edzin',
 flamojn min elbruligantajn — nobla vidvin'.
 —Kion ĵetas viaj manoj — Grafo-mortint'?
 Kion ĵetas viaj manoj — Di' helpu min!
 —La aferojn fi-tuŝitajn — fidel-edzin',
 la aferojn fi-tuŝitajn — nobla vidvin'.
 —Kion ĵetas la piedoj — Grafo-mortint'?
 Kion ĵetas la piedoj — Di' helpu min!
 —La malbonajn paŝojn miajn — fidel-edzin',
 la malbonajn paŝojn miajn — nobla vidvin'.
 —Kio estas ĉe la pordo — Grafo-mortint'?
 Kio estas ĉe la pordo — Di' helpu min!
 —La ĉeval' min atendanta — fidel-edzin',
 la ĉeval' min atendanta — nobla vidvin'.
 —Nu, avenon al ĝi portu — Grafo-mortint',

nu, avenon al ĝi portu — Di' helpu min!
 —Ĝi ne mangas ja avenon, — fidel-edzin',
 sed animojn kondamnitajn, — nobla vidvin'.
 —Kie oni vin gastigis — Grafo-mortint'?
 Kie oni vin gastigis — Di' helpu min!
 —En infero mi gastigis — fidel-edzin',
 en infero mi gastigis — nobla vidvin'.
 —Kial oni vin gastigis — Grafo-mortint'?
 Kial oni vin gastigis — Di' helpu min!
 —Ĉar ne pagis mi la ŝuldojn — fidel-edzin',
 ĉar ne pagis mi la ŝuldojn — nobla vidvin'.
 Vi fermigu tiun minon, — fidel-edzin',
 irantan monahinejon, — nobla vidvin'.
 Nu, kioma horo estas, — fidel-edzin',
 ke la koko jam ekkantas, — nobla vidvin'?
 —Dek-du horoj jam sonoris — Grafo-mortint',
 dek-du horoj jam sonoris — Di' helpu min!
 —Por mi vi ne faru preĝon, — fidel-edzin',
 ĉar ankoraŭ pli la preĝoj — doloras min.
 Nun, por nia adiaŭo, — nobla vidvin',
 nun, por nia adiaŭo, — manpremu min.
 —Mian manon vi bruligus — Grafo-mortint',
 mian manon vi bruligus — Di' helpu min!

DON JOHAN' KAJ DON RAMON'

(Kavalireca)

Don Johan' kaj Don Ramon'
 venadis el la batalo;
 unu falis el ĉeval',
 alia sur ĝi rajdadis.
 Don Johanon trafis mort';
 Don Ramon' ekmortas ankaŭ.

Lin vidas lia patrin'
 tra iu verdanta kampo:
 floretojn kolektis li,
 siajn vundojn por kuraci.
 —De kie vi venas, fil'?
 Kial via kolor' pala?

—Ho patrin', mia patrin',
 mi venas el la batalo;
 de l' bataloj de la reĝ'
 ja malmultaj revenadas;
 el ili revenis mi,
 sed mi mortas alvenante.

La liton aranĝu vi
 kie iam mi kuŝadis;
 delikata lito-tuk'

al mi por mort-tuko taŭgos.
 La kusenojn metu vi:
 ilin mi ne disŝirados.

Portas mi kaj la ĉeval'
 dudek-naŭ batojn de lanco:
 la ĉevalon trafis naŭ
 kaj min trafis la restantaj.
 La ĉeval' mortos dum nokt'
 kaj mi frue dum la tago.

Vi donos al la ĉeval'
 bonan lokon sub la stalo,
 kaj vi enterigos min
 en la vaz' de "Santa Eulària";
 en la supron metu vi
 etendita mian spadon.

En la supron metu vi
 etendita mian spadon;
 tie ĉiu trapasant'
 diros: "Ve, patrin' malgaja!
 Nur du filojn havis ŝi,
 ambaŭ mortis en batalo!"

LA TESTAMENTO DE AMELIO

(Kavalireca)

Malsanas Amelio,
 filin' de l' bona reĝ';
 ŝin vizitadas grafoj
 de granda nobelec',
 —Ve! mia kor' mortiĝas
 pro venena buked'.—
 Kiam patrin' ŝin vidas,
 jam ne estas rimed'.
 —Filin', mia filino:
 kial — via sufer'?
 —Patrin', mia patrino:
 vi scias kun certec';
 mian koron mortigis
 vi per floroj-venen'.
 —Filin', mia filino:
 baldaŭ venos konfes',
 kaj poste komunio
 kaj via testament'.
 —Mi nun jam konfesdonis,
 kun pia pardon-preĝ';
 jam estis komunio
 kaj ankaŭ testament',
 pri l' testament', patrino,
 vi ja ne ĝojos tre.
 Sep kastelojn mi havas
 en Francuj', pro hered';
 mi lasas tri kastelojn
 al malriĉula gent',

la kvaran al monaĥoj
 por bonfaroj kaj preĝ',
 l' aliajn al Don Karlo,
 mia kara fratet';
 por la Dia Patrino —
 ĉiu vest' kaj juvel'.
 Min kovru per la vesto
 el oro kaj arĝent',
 ornamu mian korpon
 la plej valora vest',
 ankaŭ perla mantelo,
 vualo kaj kusen'.
 —Domaĝe, tiajn robojn
 destini por putrec'.
 —Putriĝos nur la korpo,
 mi flugos al ĉiel'.
 —Folino: por mi kion
 vi lasos en hered'?
 —Patrin', por vi ja restos
 mia perfida edz',
 vi havu lin en ĉambro
 en maten' kaj vesper',
 vi lin prizorgu tage,
 ankaŭ en noktomez',
 per kis' kaj ĉirkaŭpremo
 kiel de antaŭ temp',
 ĉar nun mi ne malhelpos
 por via ĉirkaŭpren'.

MARIANETO

(Ama)

Adiaŭ, Marianeto,
 de mia sopir' princin!
 amlogas vi ĉiujn homojn
 sed plej suferigas min.
 Adiaŭ, Marianeto,
 de mia sopir' princin'!

Atendas nur "jes" ĉe l' pordo
 amant', kiu volas vin;
 gepatrojn ne malĝojigu
 por ne malĝojigi min,
 mi fariĝos ja monaĥo,
 ne plu ni revidos nin.

Sed kiam vi edziniĝos,
 pri tio sciigu min;
 vi sendos al mi leteron
 ĉu vi povas ami lin,
 kaj el mia monaĥejo
 mi ankaŭ respondos vin.

Se vi naskos infaneton,
 baptopatro faru min:
 almenaŭ la fil' min amu
 se ne povis la patrin'.
 Adiaŭ, Marianeto,
 de mia sopir' princin'!

Se iam en la preĝejon
 mi vidos eniri vin,
 mi petas, Marianeto,
 ke vi ne rigardu min:
 Vi rigardu al Jezuo
 kaj al Sankta Virgulin'!

LA MARISTO

(Ama)

Ĉe la bordo de la mar'
 estis knabino;
 poŝan tukon brodis ŝi
 por la reĝino.
 Ĉe la mezo de l' brodad'
 ekmankis silko.
 Ŝi rigardas al la mar':
 jen velo brilas,
 la alvenon de velŝip'
 ĝoje ŝi vidas,
 ŝi rimarkas ke marist'
 la ŝipon gvidas.
 —Ho marist', bona marist',
 vi portus silkon?
 —Blanka, ruĝa, kiel vi
 pli ĝin deziras?
 —Bela estos ruĝkolor'
 por mia silko.
 Bela estos ruĝkolor'
 por la reĝino.
 —Sur la ŝipon premi ĝin
 vi supreniru.
 —Mi ne povas, ĉar sen mon'
 nun mi troviĝas.
 Mia patro de l' monkest'
 havas ŝlosilon.
 —Ne necesas mono, ne,
 bela knabino;
 ne necesas mono, ne:
 mi ĝin kreditas.—
 La knabin' iras al ŝip'
 elekti silkon.
 Dum ŝi zorgas pri la silk'
 la ŝip' foriĝas.

Ekkantadas la marist'
 kun harmonio:
 per la kantoj de l' marist'
 ŝi ekdormiĝas,
 sed pro bruo de la mar'
 ŝi revekiĝas.
 Vekiĝinte, ŝi ne plu
 la teron vidas;
 la ŝip' jam en malproksim'
 tra l' mar' navigas.
 —Ho marist', bona marist',
 al ter' min gvidu,
 ĉar l' aero de la mar'
 min ĉagrenigas.
 —Tion ja ne faros mi,
 vi estos mia:
 longe iris mi tra l' mar'
 pro vi, knabino,
 de cent mejloj de la ter'
 en malproksimo.
 —La plej bela estas mi
 el tri fratinoj:
 la unuan vestas or',
 la duan silko,
 kaj malgaje vestas min
 nur tolo nigra.
 Ambaŭ estas aŭ princin'
 aŭ duk-edzino,
 sed mi estas, ho malĝoj',
 nur maristino.
 —Vi ne estos maristin'
 sed pli: reĝino,
 ĉar de l'reĝo de Angluj'
 mi estas filo.

LA NAJTINGALO

(Ama)

Ekfluganta al Francujo
 najtingal':
 vi salutu la patrinon,
 najtingal',
 per tril',
 fluganta
 najtingal'
 sen fal'.

Vi salutu la patrinon,
 najtingal',
 sed neniom mian patron,
 najtingal',
 per tril',
 fluganta
 najtingal'
 sen fal'.

Ĉar li min trud-edzinigis,
 najtingal',
 al paŝtisto min alligis,
 najtingal',
 kun tril'
 fluganta
 najtingal'
 sen fal'.

MONTAROJ DE CANIGÓ

(Ama)

Montaroj de Kanigo'
estas belegaj kaj ĉarmaj,
ĉefe nun en la somer'
kiam l' akvoj estas gajaj.

Tri monatojn restis mi
en ili, sen akompano,
krom de iu najtingal'
kiu ĉe la nest' kantadis.

Ĝi kantas je la leviĝ'
de la suno, rozo ĉarma,
—Najtingalo, najtingal':
havu vi bonan flugadon.

Najtingalo mortis jam:
de tri tagoj ĝi ne kantas.
Mi nun volas iri for:
nostalgie mi malgajas.

Trafis min forta malsan'
kun krulec' senkompata;
neniu komprenis min
nek mian koran malsanon

krom belega knabinet'
kiu rabis mian amon:
mian amon rabis ŝi,
nur por ŝi la koro batas.

BELEGAJ MONTOJ

(Ama)

Belegaj montoj estas
montoj de Kanigo',
dum tuta jaro floras
ilia flor-trezor'.

Vian amon, knabino,
donu por mia kor'.

En aŭtun' kaj printempo,
aromas ĉiam flor';
rozetoj kaj dianto
kun plej hela kolor'.

Vian amon, knabino,
donu por mia kor'.

Estas flor' deŝirita:
mi ĝin kunprenos for.
Ĝi estas knabineto,
mia ĝojo kaj glori'.

Vian amon, knabino,
donu por mia kor'.

LA PAŝTISTINETO

(Danco)

Kion donos ni al paŝtistineto?
 Por iri al danc', kion donos ni?
 Mi al ŝi donacus *unu kapuĉeton*
 kaj en la monteton ŝin kondukus mi.
 Nek pluvo nek neĝo falas sur montet',
 kaj la vento ĉion movas en l'eben'.
 En la ombreto, l' ombreto, l' ombret',
 floroj, violoj kaj rosmaren'.

KANTO DE L' RABISTO

Dum mi estis en junec',
 mi amadis kaj ĝojiĝis,
 kaj nun, jam en plena aĝ',
 ne plu vivas bonan vivon.

Mi fariĝis nun rabist',
 ĉiutaga belmetio.
 Transportiston rabis mi,
 revenintan el foiro.

Monon mi rabis de li
 kaj al li lasis nenion.
 Kiam min satigis mon',
 tiam mi rabis knabinon:

rabis ŝin falsa promes'
 ke ni poste geedziĝos.
 Ho adiaŭ, bela flor',
 brila stelo de l' tagiĝo!